



Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Oktobro : 3 2022

ARTEFARITA INTELEKTO AGADOS KIEL JUĜISTO EN ĈINIO

La Popola Prokurejo de Ŝanhajo-Pundong en Ĉinio kreis la unuan juĝejon kiu decidos siajn verdiktojn surbaze de artefarita intelekto. La oficejo klarigis, ke ne temas pri humanoida roboto sidanta sur podio simila al tribunalo, male la sistemo reale estas tute simila al kunportebla komputilo.



La sistemo studas la proponitan kazon dank'al la pledoj sciigitaj de ĉiuj pledantoj en la proceso. Tiam la artefarita intelekto komparas ilin kun aliaj procesoj okazintaj depost la jaro 2015, verdire miloj el ili. Fine, la komputilo proklamas sian juĝon surbaze de la verdiktoj adoptitaj en aliaj similaj procesoj. Laŭ fakuloj 97% el decidoj adoptitaj de ĉi tiu nova "juĝisto" estas pravaj.

Kompreneble, kritikoj jam aperis, tiel, se la sistemo pravas en 97% el la procesoj, tio signifas, ke en la cetera 3% la decidoj estas maljustaj. Kelkaj juristoj jam demandis, kiu estas la respondeculo de tiuj malpravaj juĝoj? Ĉu la prokuroro, la programisto, la matematikisto kiu proponis la uzitan

algoritmon? Eble pro tio, la nova sistemo por decidi juĝojn, nuntempe estas uzata nur okaze de kelkaj procesoj, kiel tiuj rilataj al trafiko, trompoj, fraŭdoj kun kredit-kartoj kaj malgrandaj raboj.

Ĉinio jam uzis aplikajn komputilajn programojn por fari justecon. Tiel, en la jaro 2017 oni ekigis sistemon en kiu civitanoj rajtis aliĝi, se ili iam devis ĉeesti, kiel pledantoj, antaŭ tribunalo okaze de juraj procesoj. Tiam, pli ol tri milionoj da homoj tion faris kaj 73.000 advokatoj partoprenis ankaŭ en la projekto, kiu ĉefe konsistis en la ĉeesto en la proceso pere de interreto. Tiuj procesoj nur povis pritrakti disputojn okaze de aĉeto/vendo de produktoj.

Vorto de la Semajno

Aŭtoritato:

1. Psika povo, influo, bazita sur la respekto, kiun iu akiris per fidindaj ecoj, saĝo, virtoj ktp.

2. Povo, rajtigita postuli obeadon

Aŭtoritata: Ĝuanta aŭ posedanta aŭtoritaton.

Senaŭtoritata: Havanta nenian aŭtoritaton.

Aŭtoritatulo: Fidinda kompetentulo.

Sinonimo: *Povumo, regado.*

Okaze de malsimilaj opinioj ĉe tribunalo, la aŭtoritata decido apartenas al la plejmulto el ties membroj.



JURA
TRIBUNO
INTERNACIA §

Numero 20
Jano 2021 : 2
Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Ni jam komencis redakti novan numeron de

JURA TRIBUNO INTERNACIA

Ĉu Vi deziras kunlabori en la revuo pere de artikolo, eseo, informo ktp?

Ek! La jura revuo en esperanto ankaŭ estas via revuo!

Kontaktu kun: jurista@esperanto.ac